

*Fiŝamiko al li diris “ Ne tre gravas la distancoj ;
Aliborde estas ja alia lando kaj la Francoj !
Ju pli longen de Anglujo, pli apude al Francujo !
Do, ne timu ! Ĉar sur ambaŭ bordoj jen por vi patrujo.
Vi konsentas, ĉu ne vere ? Vi konsentas partopreni ?
Vi konsentas, ĉu ne vere ? Ho, konsentu partopreni !*

Kiam la dancado finiĝis, Alicio interne sentis ke ĝi estas teda kaj eĉ ne sendanĝera por ŝi ; tamen ŝi diris ĝentile :—

“ Mi tre dankas ; mi tre interesiĝis vidante la dancadon ; kaj speciale plaĉis al mi tiu kurioza kanto pri la merlango.”

“ Ho, pri la merlangoj ” diris la Falsa Kelonio “ vi kompreneble vidis ilin ? ”

“ Jes ” Alicio respondis “ tre ofte mi vidis ilin en la frit— ”

“ Pri *Lafrito*, mi ne scias kie sidas tiu urbo ” diris la Falsa Kelonio “ sed se vi tre ofte vidis ilin, vi kompreneble konas kian aspekton ili havas ? ”

“ Mi kredas ke jes ” diris Alicio, konsiderante. “ Ili havas la vostojn en la buŝoj ; ankaŭ ili estas kovritaj per paneroj.”

“ Pri la paneroj vi eraras ” diris la Falsa Kelonio “ ili ne povas pro la marviŝo teni panerojn sur la korpo. Sed pri la vosto vi ne eraras, kaj la kaŭzo ja estas— ”

En tiu momento la Falsa Kelonio oscedis kaj fermis la okulojn, dirante al la Grifo : “ *Vi* diru al ŝi pri la kaŭzo kaj ĉion tion.”

“ La kaŭzo estas ” diris la Grifo “ ke ili persistis iri danci kun omaroj ; do, oni ĵetis ilin malproksimen en la maro ; do ili havis tre longan falon ; do, la vostoj fiksiĝis en la buŝoj, kaj oni ne povis malfiksi ilin ; do—jen ĉio.”

“ Mi dankas ” diris Alicio “ tio estas por mi tre interesa. Ĝis hodiaŭ mi sciis tre malmulte pri merlangoj.”

“ Mi povas diri al vi pli ol tio, se al vi plaĉos, ” diris la Grifo. “ Ĉu vi scias kial oni nomas tiun fiŝon merlango ? ”

“ Mi neniam pripensis tiun demandon ” diris Alicio. “ Kial do ? ”

“ Ĉar ĝia lango estas ĉiam en la maro ” klarigis la Grifo “ kaj la maron ĝi prefere silabas per ‘ e ’ nur pro ĝia partianeco por la Francoj ; vi kredeble rimarkis per kia sopira voĉo ĝi kantis ‘ *pli apude al Francujo.* ’ ”

(En la angla teksto li tute alie klarigis la nomon. Por ekkompreni ĝin, oni devas identigi en la pensoj la vortojn “ merlango ” kaj “ blankigilo ” kiuj en angla lingvo havas saman sonon *ŭhajting*. Jen la teksta dialogo :—

“ Ĉu vi scias kial oni nomas ĝin merlango ? ” diris la Grifo.

“ Mi neniam pripensis tiun demandon ” diris Alicio. “ Kial do ? ”

“ Ĝi poluras la bot-kaj ŝuojn ” diris tre solene la Grifo.